# N I A   V O Ĉ O

## Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3ş-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

**SEPTEMBRO – OKTOBRO 2005**


### NEKROLOGOJ

La genia tradukinto de Don Kiĥoto al Esperanto, **Fernando de Diego**, mortis en Zaragozo la 30an Junio. Ĉiuj parolantoj de la internacia lingvo konas lin kaj liajn verkojn. Tiuj verkoj estis unu el la gravaj vivo-manifestiĝoj de Esperanto dum la dua duono de la pasinta jarcento. Plenmerite, do, li estis honora membro de Universala Esperanto-Asocio kaj, ĉefe, ricevis honoran lokon en la koro de ĉiuj esperantistoj, kiuj pere de li konatiĝis kun la hispana kulturo. Li estis, interalie, la plej sukcesa ambasadoro de tiu kulturo en la Esperanta mondo. Madrida Esperanto-Liceo eldonis sian tradukon de hispana poezio (Sentempa simfonio) kaj reeldonis la lernolibron de esperanto por hispanoj (Nuevo método de esperanto)

En Alcalá la Hispana Esperanto Kongreso omaĝis al de Diego kiel unu el niaj plej elstaraj samlingvanoj. Lia frato ricevis memor-platon en kortuŝa ceremonio post omaĝ-vortoj de Antonio Valén, Jorge Camacho, Lorenzo Nogueras kaj Miguel Angel Sancho.
Fernando mortis sed lia spirito certe ankoraŭ longe vivos inter ni kaj inter la postaj generacioj de parolantoj de Esperanto.

Ankaŭ en junio, en Poznano (Pollando), forpasis **Adamo Goralski**, grava mecenato kaj tre meritplena esperantisto. Konante ses lingvojn li ekinteresiĝis pri Esperanto en 1975. Li finis fundamentan kurson en Poznano kaj daŭrigan ĉe la Laguna Universitato en Tenerifo (Kanariaj Insuloj) en 1978/79. Bedaŭrinde post okuloperacio li perdis vidkapablon kaj komencis aktive labori por la esperantistaro tutmonde surbendigante artikolojn, skeĉojn, interparolojn, muzikon. Dum dek du jaroj li dissendadis la bendojn al blindaj samideanoj diverslande. Li fondis Antoni Grabowski-Fondaĵon ĉe UEA per kiu li celis monpremii talentajn, junajn esperantistojn, partoprenantojn en la Belartaj Konkursoj.

Longjare li agadis kaj subtenadis E-asocion en Karakaso (Venezuelo), kaj E-asocion en Tenerifo. Malavare subtenis la grafikan centron en Antverpeno. Riĉe provizis la Hispanan E-Muzeon, kies fondinto estis samideano Luis Hernandez Yzal. La biblioteko en poznana E-asocio pliriĉiĝis per pluraj, valoraj libroj danke al s-ro A.Goralski. Multjare li subtenadis infanajn kongresetojn, organizatajn samtempe kun Universalaj Kongresoj.

Pace ripozu ambaŭ.

### NOVA ESTRARO DE HEF

Dum la prepar-kunsido de la Asembleo de HEF kaj por eviti la senkapan funkciadon de la asocio, oni proponis kandidatecon por la nova estraro. Kelkaj el la kandidatoj ĉeestantaj manifestis personajn problemojn kiuj povas depreni labortempon por HEF-taskoj. Sed finfine ĉiuj akceptis prezenti la kandidatecon nur kiel provizora solvo kaj post la ofero de helpo de la forirantaj estraranoj. Pro tio eble dum la venontaj kvar jaroj la laboro de HEF ne estos tiel brila kiel en la antaŭa periodo sed la nova estraro laboros kun iluzio.

| | | | |
|---|---|---|---|
| Prezidanto: | Augusto Casquero | Vic-Prezidantino: | Lupe Sanz |
| Sekretariino: | Carmen Suárez | Kasisto: | Pedro A. Garrote |
| Estrarano: | Luis Hernández | Estrarano: | J.Mª Galofré |
| Redaktoro de Boletín: | Manolo Pancorbo | | |

### INTERNACIAJ KONGRESOJ

Kiel kutime Augusto Casquero organizis karavanon al UK de Vilnius ekde Valencio, ankaŭ vojaĝis tien Angelita Sanz kiu raportis pri la agado en la litova kongreso. Angelita ankaŭ partoprenis en la Internacia Turisma Semajno de Calella kiu okazis je la unua semajno de Oktobro.

### ESPERANTO EN EŬROPO

La 5-an de julio la pola eŭroparlamentanino Margareta Handzlik (EPP-ED) estis akceptita en Strasburgo de s-ro Jan Figel, membro de la Eŭropa Komisiono pri edukado, kulturo kaj multlingvismo. La renkontiĝo estis plene dediĉita al la problemoj de multlingvismo de EU. Jan Figel aŭskultis kun intereso proponojn de la pola membro de la Eŭropa Parlamento pri ebla uzo de Esperanto kiel propedeŭtika ilo por plifaciligi la studadon de fremdaj lingvoj. S-ro Figel serioze traktis la proponojn kaj petis de Margareta Handzlik plurajn informojn tiurilate. Oni interkonsentis pri pluaj laborkontaktoj.

### BIOGRAFIO DE ZAMENHOF

Pro diversaj eldonistaj kaj presejaj problemoj la libro "El hombre que desafió a Babel" ankoraŭ ne estas preta, bedaŭrinde ĝi ne povis aperi dum la pasinta kongreso.
Nun feliĉe ĝi jam estas en la presejo kaj ni esperas dissendi ekzemplerojn al tiuj, kiuj antaŭpagis ĝin, profitante la oferton de MEL, je la fino de oktobro.

## NOVA LIBRO JE LA FINO DE OKTOBRO
## **"El hombre que desafió a Babel"**

Hispana versio de la biografio de Zamenhof verkita de Masson/Centassi tradukita far membroj de Madrida Esperanto-Liceo. La prezo de la libro estas 20 eŭroj sed por vendoj ĜIS DECEMBRO, Madrida Esperanto-Liceo havas grandan oferton:

po 23 eŭroj vi ricevos **"El hombre que desafió a Babel"** kaj **"Nuevo Método de Esperanto"**; la prezo inkludas sendokoston al Hispanio.

Antaŭpago necese al la konto je la nomo de Madrida Esperanto Liceo ĉe
Banco Sabadell/Atlántico numero 0081/7110/98/0001266730

**4ª CENTJARIĜO DE "DON QUIJOTE"**

Toño del Barrio, Direktoro de Fundación Esperanto, transdonis ekzempleron de la traduko de Donkiĥoto al la Biblioteca Pública Regional de Madrid "Joaquín Leguina".

**Projekto "Donkiĥoto parolas Esperanton" subvenciita**

En la pasinta numero ni informis ke la Ministerio de Kulturo havigos al HEF subvencion de 3.000 eŭroj por la projekto. Nun ni havas alian bonan novaĵon: alia fako de la sama Ministerio, tiu pri la Libro kaj Bibliotekoj, ankaŭ subvenciis nian projekton pere de 6.000 eŭroj.

La monon donacitan estos dediĉita al konkurso de infanaj desegnoj, partopreno en *Expolingua*, kongreso de Alcalá de Henares, ellaboro de dokumentoj pri la tradukoj al Esperanto de la verko de Cervantes, aŭ donaco de diversaj ekzempleroj de la esperanta traduko al publikaj institucioj kun rilato al la aŭtoro kaj la verko.

Ĝuste pri tiu ĉi lasta agado ni bezonas la kunlaboron de la esperantaj grupoj, kaj de la unuopaj aktivuloj. Inter la agadoj planitaj troviĝas la disvastigo de nia lingvo, de la literaturo kaj specife de la traduko de Donkiĥoto, pere de la organizado de diversaj agadoj en la urboj kie troviĝas esperantistoj, aŭ kie tiuj ĉi povas agadi. Kion ni proponis estis profiti de la donacado de Don Kiĥoto al bibliotekoj, muzeoj aŭ aliaj institucioj, por organizi kampanjon de informado pri la lingvo, pere de prelegoj, sendo de raportoj al komunikiloj, ekspozicioj aŭ similaj elmontroj. La ekzemplerojn de la libro povas liveri (tute senpage por tiu ĉi celo) Fundación Esperanto. Alia materialo, kiel informaj dokumentoj, broŝuroj, elektronikaj prezentoj, estas je ĉies dispono. HEF faras alvokon por ke ni ĉiuj profitu de tiu ĉi eksterordinara cirkonstanco por montri la vivantecon de la lingvo kaj la movado en plej diversaj urboj de Hispanio. (Informas Toño del Barrio)

**SATEH en la "Fiesta del PC"**

Dum la semajnfino de la 16a al la 18a de septembro, SAT-en-Hispanio triafoje partoprenis per propra budo en la konata Festo de la Komunista Partio de Hispanio, kiu okazis en la madrida "Casa de Campo".

**VENONTAJ KONGRESOJ**

**Andaluzia E-Kongreso.** Malago de la 8a ĝis la 9a de oktobro

**13ª Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo**. Calella (Barcelona) 1a ĝis la 8a de Oktobro.

---

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid